

El Diario Montañés

Dum la jaro 2008 aperis en tiu regiona jurnaloo diversaj mencioj pri Esperanto.

La 12-a de februaro, Ana Rodríguez de la Robla mencias en artikolo pri muzika reprezentado diversajn lingvojn, ankaŭ Esperanto estas uzata por montri mankon de komunikado. La 2-a sammonata jam Guillermo Balbona faris la saman mencion en hispana versio de teatraĵo verkita de Tony Kushner.

Jurnalisto Manuel Alcántara, kiu ofte mencias Esperanton, skribis la 9-a de aprilo: «El fuego sagrado del deporte, que es la única competición incruenta y que además es el único esperanto en el que pueden entenderse todas las razas y todos los seres humanos, sufrió un apagón en la ciudad de la luz (*Parizo*)».

La okazigo de edziĝceremonio inter surda kantabrino kaj dano kaŭzis aperigon de raporto, la 15-a de junio, kun mencio de la internacia lingvo tiel: «como en otros muchos órdenes, los sordos tampoco tienen su esperanto universal, sino que cada país también cuenta con su propia lengua para discapacitados auditivos».

La 1-a de aŭgusto, la regiona prezidanto, S-ro Miguel Ángel Revilla, asertis, en intervjuo pri la reformo de Senato, ke «el español no sufre problemas, sino que, por el contrario, es una lengua “imparable” que “preocupa” en Estados Unidos y que, a finales de siglos, quien hable español e inglés

“será como si hable esperanto”».

Denove Manuel Alcántara, kies artikoloj aperas en la gazetoj apartenantaj al Vocento, sub la titolo «Más ruido que furia» skribis jenon: «Por eso decimos que una fiesta ha estado muy animada y también por eso echamos de menos el silencio, que es el idioma que hablamos todos cuando nos callamos. El verdadero esperanto.

Ree pri Esperanto

En la jaro 2006 Manuel Arce, proprietulo de librejo kaj artgalerio *Sur*, kiu antaŭ kelkaj jaroj finis gravan etapon de la loka kulturo en Santander pro emeritiĝo, verkis rememorojn en libro sub titolo *El latido de la memoria*. Esperanto estas mencita en paĝoj 19, 27 kaj 242. Unue ni legas: «Sólo cuando Martín se vino a vivir a la ciudad, una tarde que acompañó a Dante al Ateneo Popular, mientras éste asistía a su clase de esperanto, ...». La dua mencio aperas en demando: «¿Vas al Ateneo a las clases de esperanto? Le dijo que no...» La lasta tekstas jene: «En el portal de las Positivas, Libertad les dijo que Dante estaba en el Ateneo, en la clase de esperanto.»

Forgeso

En *Saluton* n-ro 15 ni devis mencii viziton de D-ro Rüdiger Sanchs (emerita veterinaro), sia edzino kaj filino S-ino Martina Braß (kiu jam estis en nia urbo okaze de labora vizito al apuda Torrelavega).

Liven Dek



Ĵus aperis grava studverko en angla lingvo (740 paĝoj) pri literaturo en esperanto. Ĝia titolo estas *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto. 1887-2007* kaj ĝia aŭtoro Geoffrey H. Sutton. Tie aperas tri paĝan studon pri la verkoj de nia prezidanto, Miguel Gutiérrez Adúriz.

Apude la komenca teksto tiel kiel ĝi aperas en supre mencita verko.

«Gutiérrez Adúriz, Miguel [pseud. Liven Dek, María Zocato Diez] (b. 1950) Spanish chemical engineer; learnt Esperanto in 1970. Gutiérrez was editor of *Boletín*, organ of the Spanish national Esperanto association. He has worked with *Literatura Foiro*, *Fonto*, *La Kancerklíniko*, *Kontakto* et al. Gutiérrez is director of the Spanish Fundación Esperanto and a judge in its literary competitions and in those of the Internaciaj Floraj Ludoj. His own work has won prizes in the Literary Competitions at world Esperanto congresses.»

Ekskursuo



La 15-a de novembro ni ekskursis al Arenas de Cabrales kaj poste ni vizitis la *Aula de la Miel*, en Alles (Asturio), kie ni estis informataj pri la abela vivo kaj manĝis tipe astura tagmanĝo.

Zamenhof-Tago



Sabate, la 13-a de decembro, la anoj de Kantabra Esperanto-Asocio kune tagmanĝis en restoracio por celebri kaj rememori la naskiĝtagon de la iniciatinto de Esperanto, D-ro Ludoviko Zamenhof.

Renovigo de kotizoj

En la komenco de nova jaro alvenas la momento renovigi kotizpagojn, ankaŭ al Esperanto-organizo. Ja, kiel diris D-ro Humphrey Tonkin dum Festparolado okaze de lasta Universala Kongreso, ne temas pri simpla plia elspezo. En hodiaŭa mondo aktiva esperantisto povas esti per la sola uzo de la reto; nu, ne estas bezonataj organizoj, kiel antaŭe. «Servoj similaj al tiuj, kiujn ni liveras al la membroj,

estas pli kaj pli ofte liverataj al la uzantoj de la reto senpage kaj pli rapide». Pro tio la kotizoj ne devas esti rigardataj kiel elspezo, sed kiel investo. Ni investas je *Esperanto* kaj esperas pri la bonaj fruktoj de tiu investo. Nu, «ĉefe ni dediĉu nian forton al la disvastigo de la lingvo, ĉar ju pli da homoj ĝin parolas, des pli valoras ĝi fariĝas; ju pli da homoj posedas ĝin, des pli utila ĝi fariĝas al ĉiu posedanto».



Numero 16

Januario 2009

CONVOCATORIA Junta General Ordinaria

De acuerdo con los estatutos de esta Asociación, por la presente se convoca a los señores socios a la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el día 23 de Enero de 2009, en San Fernando 58, principal 8, a las 19.30 horas, en primera convocatoria, o, en caso de no poder constituirse válidamente la asamblea, a las 20 horas del dicho día, en segunda convocatoria, para deliberar y decidir en torno al siguiente

ORDEN DEL DÍA

- 1º Lectura y aprobación, en su caso, del acta de la Asamblea General Ordinaria anterior.
- 2º Memoria de actividades en el ejercicio de 2008.
- 3º Examen del balance del ejercicio de 2008, rendición de cuentas y aprobación, si procede.
- 4º Presupuesto para el ejercicio de 2009.
- 5º Proyectos y propuestas de la Junta Directiva.
- 6º Proposiciones formuladas por los señores socios de acuerdo con los estatutos.
- 7º Ruegos y preguntas.

Esperando su puntual asistencia, le saludar atentamente.

Miguel Gutiérrez Adúriz (Presidente)

ASOCIACIÓN CÁNTABRA DE ESPERANTO

Banka konto ĉe CAJA CANTABRIA: 2066 - 0050 - 89 - 0900046108

Apartado de Correos 2.240. 39080 SANTANDER (Cantabria)

676 - 27 50 60 **NIF: G39077201** Cuota Anual: **15 €**